

SESA PASKA DIMANĈO – 25an de majo 2014

MI PETOS LA PATRON KAJ LI DONOS AL VI ALIAN GVIDANTON – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El evangelio laŭ Johano 14,15-21

En tiu tempo Jesuo diris al siaj disĉiploj: "Se vi amas Min, vi observos miajn ordonojn. Mi petos la Patron, kaj Li donos al vi alian gvidanton, la Spiriton de la vero, kiu estos kun vi por ĉiam. La mondo nek vidas, nek konas Lin; pro tio ĝi ne povas ricevi Lin. Sed vi konas Lin, ĉar Li restas kun vi kaj estos en vi.

Mi ne lasos vin orfoj: Mi revenos al vi. Ankoraŭ iom da tempo, kaj la mondo ne plu vidos Min; sed vi vidos Min, ĉar mi vivas, kaj vivos ankaŭ vi. Tiam vi scios ke Mi estas kunigita kun mia Patro: vi kun Mi, kaj Mi kun vi.

Kiu vere amas Min, estos amata de mia Patro; Mi ankaŭ amos lin, kaj Mi elmontros Min al li".

Por la unua fojo en la evangelio de Johano Jesuo petas amon al si mem. Sed li tion faras nur post manifestiĝo ĝis maksimumo de sia amkapablo, iĝante servado por la siaj, post la lavado de iliaj piedoj. Ni estas ĉe la ĉapitro 14 de la evangelio de Johano, ekde la versiklo 15.

Jesuo diras: "Se vi amas Min" do por la unua fojo li petas amon al si mem, "vi observos miajn ordonojn". Estas ununura ordono kiun Jesuo lasis dum la vespermanĝo, tio estas ami unu la alian kiel li amis ilin, tio estas kiel li servadis al ili. Jesuo do diras: "Se vi amas min, servu unu la alian".

Tio kion Jesuo petas ne estas amo al li, sed la pruvo de la amo al Jesuo estas la reciproka amo kiu iĝas servado al la aliaj. Nu, kiel respondo al tiu amo, Jesuo anoncas ke li preĝos la Patron, *"kaj li donos al vi alian gvidanton"*, greka vorto malfacile tradukebla, kiu signifas "tiu kiu alkuras helpopreta, tiu kiu helpadas, kiu defendas", la protektanto. Ĝi ne estas iu nomo de la Spirito, sed iu funkcio. Jesuo, dum li estis vivanta, plenumis tiun funkcion de paŝtisto kiu protektas la siajn kaj pretas fordoni sian vivon. Bone, nun ke li ne plu ĉeestos, ĉeestos lia Spirito.

Kaj tio estos avantaĝo. Fakte Jesuo diras: *"kiu estos kun vi por ĉiam"*. Dum Jesuo ne ĉiam povis esti kun siaj disĉiploj, lia Spirito estos ĉiam en la komunumo. La fakto ke tiu restos porĉiame, tio signifas ke la agado de tiu Spirito ne intervenas en la danĝeraj momentoj aŭ en la krizaj situacioj, sed Ĝi ilin antaŭas. Kaj tio donas plenan sekurecon kaj serenecon al la kristana komunumo. Jesuo difinas tiun Spiriton *"La Spirito de la vero"* – la vero estas la amo kiu iĝas servado – *"kiun la mondo ne povas ricevi"*.

La mondo estas la sistemo de povo kiu estas neakordigebla kun la amo kiu iĝas servado. Li fakte diras: *"nek vidas nek konas lin"* – En tiu ĉi evangelio tiuj kiuj ne konas Jesuon, tiuj kiuj ne konas la Patron, estas la religiaj aŭtoritatuloj. Kiu vivas en povomedio ne povas eĉ minimume kompreni kion signifas amo kiu iĝas servado. Kaj Dio estas tio.

"Sed vi konas Lin, ĉar Li restas kun vi kaj estos en vi". La evangeliisto utiligas la saman verbon de la Spirito kiu restas sur Jesuo. *"Kaj li estos en vi"*. Samkiel la Spirito restas en Jesuo, tiel same tiu Spirito restas en la komunumo de la kredantoj. Kaj plie Jesuo donas sekurecon – li estas anoncanta sian morton – *"Mi ne lasos vin orfoj: Mi revenos al vi."* La Lia ne estos foresto, sed eĉ pli intensa ĉeesto. *"Ankoraŭ iom da tempo, kaj la mondo ne plu vidos Min"*, la mondo de povo ne povos plu lin vidi fizike, *"sed vi vidos Min"*; kion tio signifas? La agordo kun la vivo de Jesuo lin igas ĉeestanta, viva kaj viviga ene de lia komunumo.

"Ĉar mi vivas, kaj vivos ankaŭ vi". Kiu en sia vivo nutras la aliajn tiu spertos ĉiam tiun kiu iĝis vivopano por nutri la siajn. *"Tiam"* kiu estos la tago de la morto kaj de la elmonro de la Spirito, *"vi scios ke Mi estas kunigita kun mia Patro"* en la pleneco de la dia kondiĉo *"Kaj vi kun Mi, kaj Mi kun vi."*

Realiĝas tio kion de ĉiam la evangeliisto anoncadis: Dio estas amo kiu petas esti akceptata por kunfandiĝi kun la homoj kaj plivastigi la

amkapablon tiel ke la komunumo iĝu la ununura videbla sanktejo en kiu elradias la amo de Dio. En la komunumo de la kredantoj Dio surprenas homan vizaĝon kaj la homoj alprenas dian vizaĝon.

Kaj Jesuo konkludas dirante: *“Kiu akceptas miajn ordonojn”* , li substrekas ke temas pri liaj ordonoj, kaj ne pri tiuj de Moseo. Tio estas la ununura ordono, la praktikaj plenumoj de tiu ununura ordono de la amo kiu iĝas servado, por Jesuo estas samgravaj kiel la ordonoj. *“kaj ilin observas, tiu vere amas Min”*.

La amo al Jesuo do ne adresiĝas al lia persono sed adresiĝas al la aliaj en la praktikado de liaj ordonoj, tio estas en la alproprigo de la samaj valoroj de Jesuo. Ju pli la homoj estas homaj des pli ili permesos al dieco surfaciĝi en ili. Tiu estas la am-agordo de Dio kun la homoj, kaj de la homoj kun Dio.

Kaj laste la konkludo, *“Kiu vere amas Min, estos amata de mia Patro; Mi ankaŭ amos lin, kaj Mi elmontros Min al li”*. Jesuo do konfirmas ke se estas tiu dinamismo de amo ricevita kiu transformiĝas en amon donatan, la komunumo iĝos la ununura sanktejo kie manifestiĝas la amo de la Patro. Ju pli granda estos la respondo de la homoj per la praktikado de la amo al la aliaj, des pli granda estos la respondo de la Patro per nova elmontro de la Spirito kaj de novaj amkapabloj al la siaj.